Triesta Esperanto-Asocio

Agadraporto por la 2016ª jaro

Januare – Publika prezento de la libro "Kiam ekfloras la migdalarbo...", tradukita de la triesta dialekto al Esperanto. La salono estis disponigita de la eldonejo mem LUGLIO SPRINT. La eldonado ricevis la subteno de la Regiono Friulo Julivenetio, laŭ leĝo pri la defendo kaj protekto de la minoritataj lingvoj.

Junie: Kunlabore kun la Poŝta kaj Telegrafa Mezeŭropa Muzeo de Triesto, estis muntita ekspozicio pri: ESPERANTO KAJ FILATELO (L'ESPERANTO NELLA FILATELIA) en la muzeaj ejoj. Grave nin subtenis finance la Itala Esperanto-Federacio. La ekspozicio daŭris de junio ĝis la 9ª de septembro. En la muzeo, en diversaj tagoj estis prezentitaj la libroj: KIAM EKFLORAS LA MIGDALARBO..., kaj HOME SEN HOMECO de Martin Stuppnig, de li skribita germane kaj de hungara esperantisto tradukita Esperanten. Fine publika prezentaĵo pri "L'Esperanto in cartolina. Storia ed evoluzione grafica delle cartoline esperantiste".
Por la aranĝo estis faritaj speciala poŝtkarto, porokaza stampo, koloraj invitiloj, broŝuroj.

Novembre: Okaze de la 25ª datreveno de la Kroata E-Unuiĝo, partopreno en la Seminario: KROATA LINGVO – KULTURO – HISTORIO, organizita de Marija Belošević en kiu Edvige Ackermann kaj Elda Doerfler alportis siajn kontribuojn.

Decembre: Konkurso pri Pentraĵoj dulingvaj, kun la temo "Paco". Alvenis entute 41 verkoj el kiuj 29 ellaboritaj de geknaboj ĝis 14 jaroj. La partoprenintaj aŭtoroj estis el la italaj regionoj Friulo Juli-Venetio kaj Apulio, Slovenio kaj Serbio. Post tio oni estis invititaj prezenti la lingvon Esperanto antaŭ tri klasoj de la mezgrada lernejo *F. Rismondo.*

Dum la jaro oni prezentis 6-foje Esperanton enkadre de la alirprogramoj de RAI regiona.

Elda Doerfler